# *Caricom postulas Usonon ?esigi la punojn kontra? Kubo kaj Venezuelo*



Bridgetown, apr 16 (RHK) La membrolandoj de la kariba komunumo Caricom okazigis ur?an pintkunsidon pere de videokonferenco en Barbado, lando kiu prezidas portempe la kariban blokon.

Dum la kunsid o oni pritraktis la sansituacion, la nutran sekurecon kaj la protektadon de la maljunuloj fronte al la pandemio, krom restarigi la agadojn post la epidemio.

La membroj de Caricom petis al Usono ?esigi ?iujn punojn kontra? Kubo kaj Venezuelo, tiel ke ?iuj landoj devas kundividi la tutmondan strebon por batali kontra? la Covid-19.

Por helpi en la batalo kontra? la nova kronviruso, Kubo efektivigas solidaran laboron per siaj sanitaraj brigadoj de la ta?mento Henry Reeve, kiu fakas pri alfronto al katastrofoj kaj epidemioj.

?i-rilate oni raportis ke landoj kiel Jamajko, Barbado, Antigvo-Barbudo, Belizo, Grenado, Dominiko, Sankta Lucio, Sankta-Kito kaj Neviso, Surinamo, Sankta Vincento kaj Grenadinoj ricevis tiujn laborbrigadojn.

Trinidado kaj Tobago, Bahamoj kaj Haitio jam havas de jaroj kuracistajn laborbrigadojn, kiuj nuntempe anka? atentas pacientojn de la kronviruso.

La pandemio provokis pli ol 1500 malsanulojn de la Covid-19 en la regiono, nombro kiu plu kreskos.

---